Jarkolekto : 2008 | Numero : 2 | Paĝo : 1

# La *Voĉo de Amikejo*

Informilo pri **Senlime** kaj **Esperanto** en Eŭregiono Mozo-Rejno

Sendita al :

BELGIO NEDERLANDO GERMANIO

Senlime
Esperanto-Asocio en Eŭregiono Mozo-Rejno
Avec le soutien de la Communauté française

**En cas de non-distribution, renvoyer à**
H. Lentzen
Feldweg 20
BE-4701 KETTENIS
Tel. xx-32-(0)87-55.43.26
E-mail : lentzen@senlime.org

**Editeur responsable**
**Responsa eldonanto +**
**Informoj en la franca lingvo:**
Tel. +32-(0)87/33.02.92
GSM +32-486-947.957
Mail: jacques@senlime.org
J.-M. Jacques, 5 rue J. Wauters,
BE-4800 VERVIERS

**Informatie in het Nederlands**
**Informoj en la nederlanda:**
Tel. xx-31-(0)43-455.14.36
Mail: parren@senlime.org
P.H.H. Parren, Heimansstr. 16
NL-6285 AM EPEN

**Informationen auf deutsch**
**Informoj en la germana:**
Tel. xx-49-2406-7809
Mail: hogen@senlime.org
K. Hogen, Schütz-v-Rode-Str. 43
DE-52134 HERZOGENRATH

**Aperas kvarfoje en jaro kaj rete elŝuteblas ĉe www.senlime.org**

**Prezoj por BE, NL kaj DE :**
**Unuopa n-ro : 3 EUR**
**Jara abono : 10 EUR**

Bonvolu pagi, prefere decembre aù januare, **NUR** al la konto :
**979-5327148-10**
IBAN : BE41 9795 3271 4810
BIC : ARSPBE22
(banque : Argenta)
de ***Senlime***, 25 rue Pierre Fluche, 4800 VERVIERS, Belgio.

Ek de 2008, la kotizo (nedeviga sed bonvenigata) estas disigita de la abono al la papera versio de tiu-ĉi informilo (kompreneble pagenda).

# La Kelmis-a urbestraro, la Esperanta Civito kaj Senlime

## invitas vin al speciala festo en Kelmis,

pro la 100a datreveno de la projekto "Amikejo", kun la esceptokaza partopreno de la Civitaj parlamentanoj okaze de la 10a datreveno de la fondiĝo de la Esperanta Civito, dimanĉon la 26an de julio je la 11h00.

**Provizora programo** :

- Akceptejo en urbo-domo je la 11h00 (paroladoj kaj aperitivo).
- Komentita promenado tra parto de la iama « Amikejo »
- Bankedo je la 13h00, kulturaj eroj inter la pladoj :
  - Filmeto de Peter Boulhuys pri *Amikejo*
  - Filmo pri la samnoma teatraĵo de M. Schrymecker unuafoje ludita en Kelmis en 2006
  - k.t.p.
- Disiĝo ĉirkaŭ la 16h30.

**Pliaj informoj kaj aliĝilo** : vidu nian junian numeron (devigaj aliĝo kaj antaùpago).

**Kio estas la Esperanta Civito** ?

"Le Monde diplomatique" en esperanto aperigis tre interesan analizon de la talenta ĵurnalisto Vilhelmo Lutermano pri la stato de Esperantio, kun aparta atento pri tri subjektoj: UEA, SAT, Esperanta Civito. La analizo estas sobra, foje eĉ draŝa (legu sur nia p. 4 artikolon publikigitan de HeKo pri tio). Tiuj, kiuj ne bone konas la Esperantan Civiton, nepre detale pristudu ĝian ttt-ejon : http://www.esperantio.net/.

# ESPERANTO✪

## Eŭregiona kalendaro 2008 (1/2)




***Senlime*** publikigas, por siaj membroj, agendon pri la esperanto-aranĝoj en la Eŭregiono Mozo-Rejno. Ĝi aperas rete kaj papere.

« Trilandaj renkontiĝoj » estas organizitaj de kiu ajn esperantisto aŭ esperanto-grupo en Eŭregiono Mozo-Rejno interkonsente kun la komitato de ***Senlime***. Principe ili okazu dufoje en jaro (printempe kaj aŭtune), laŭvice en ĉiu el la tri landoj (BE, DE, NL).

Tiu-ĉi agendo eventuale povas enhavi programerojn de lokaj grupoj aŭ aktivaĵojn organizitajn aŭ subtenitajn de komitatanoj. Ĝi neniel iĝu kompleta kalendaro de esperanto-aranĝoj (aliaj ekzistas).

La Kelmis-aj kunvenoj de la grupoj de ***Senlime*** nun regule okazas ĉiun trian vendredon de monato en kultur-centro "Select", Lutticherstr. 264.

Por kiu ajn propono pri kunlaboro, ĉiam ege bonvena kaj atendata, bonvolu kontakti, prefere rete kaj kiel eble plej frue, la responsulon pri la kalendaro : Jean-Marie **Jacques** (jacques@senlime.org).

**04-18** 19h30 BE-Kelmis, Select: (trajn)simulado per komputilo.
Inf. jacques@senlime.org
XX-32-(0)87-330292

**05-16** 19h30 BE-Kelmis, Kinarto en esperanto : ***«Angoroj»***
Inf. mardelforge@brutele.be

**06-20** 19h30 BE-Kelmis, Select: esperanta **karaoke**o.
Inf. lousberg@senlime.org

**07-26** 19h30 BE-Kelmis : festo pro 100a datreveno de Amikejo kaj 10a datreveno de fondigho de la esperantia Civito.
Inf. jacques@senlime.org

**08-30 kaj 31** 15h…
BE-Kelmis : 2a "Neùtralia"-festo memore al la projekto pri sendependa ŝtato en Moresnet (informejo pri Amikejo kaj esperanto en Select).
Inf. urba administrantaro.

Pliaj kunvenoj en BE-Kelmis, Select, okazos la : **09-19, 10-17, 11-21** kaj **12-14** (Zamenhof-festo).

**18-04** 19h30 BE-Select: simulation (de train) sur ordinateur.
Inf. jacques@senlime.org
XX-32-(0)87-330292

**16-05** 19h30 BE-Kelmis, Cinéma en espéranto : ***«Angoroj»*** ["Angoisses"]
Inf. mardelforge@brutele.be

**20-06** 19h30 BE-Kelmis, Select: **karaoké** en espéranto.
Inf. lousberg@senlime.org

**26-07** 19h30 BE-Kelmis : fête 100e anniversaire d'Amikejo et du 10e anniversaire de la fondation de la Cité espérantienne.
Inf. jacques@senlime.org

**30 et 31/08** 15h…
BE-Kelmis : 2e fête "Neutralia" en souvenir du projet d'état indépendant à Moresnet (point d'information sur Amikejo et l'espéranto au Select).
Inf. administration communale.

Réunions suivantes au Sélect, La Calamine (BE), les: **19-09, 17-10, 21-11** et **07-12** (fête Zamenhof).



# Niaj programeroj lupee

## *detaloj pri anoncitaj prelegoj, vesperoj, festoj,…*

**<u>Trajnsimulado per komputilo</u>**

Ekzistas pluraj softvaroj pri fervoja simulado sur la merkato de la komputilaj ludoj sed la tiufakaj referencoj, "Microsoft Train Simulator" kaj "Auran Trainz", postulas potencan komputilon.

"**ArcRail**", malpli postulema, simulas la mision de kondukisto kiu devas manovri sian trajnon respektante la signalaron (kaj sendanĝere renkontpasi aliajn trajnojn). La ludo proponas variajn pejzaĝojn. Ĝi enhavas eldonilon por krei siajn proprajn vojirojn, malfeliĉe ne sufiĉe realismaj.

"**Boso View Express**" **(BVE),** senpaga japana ilo, multe pli realisme simulas la kondukon de trajno, kun tre altkvalita grafismo. Ĝi kalkulas la reagon de la trajno laŭ ĝiaj teknikaj proprecoj, la linia kliniĝo, la kurva radio, k.t.p.

Multaj vojoj, trajnoj, subtrajnoj kaj tramoj rete elŝuteblas*[(1)]*.

Per komplementa softvaro eblas krei siajn proprajn vojirojn. Eble ***Senlime*** tiel povos virtuale rekrei la germanan tramvojon Akeno-Kelmis, kiu servis de marto 1907 ĝis 1944. Nepre venu se vi volas malkovri la antaŭprojekton de…

Jean-Marie **Jacques**

**04-18** 19h30 BE-Kelmis, Select: trajnsimulado per komputilo.
Inf. jacques@senlime.org
XX-32-(0)87-330292

***(1)*** http://www.bve-routes.com/

**<u>« Angoroj »</u>**

Angoroj fakte estis la unua fikcia filmo longdaùra originale ludita en (bona !) esperanto… unu jaron antaù « Incubus ».

La (profesia) realiginto, J-L. Mahé, celis demonstri la vivantecon de esperanto kaj tial lokigis la geaktorojn en tavolon de la popolo kie oni ne kutime parolas intelekte, sed slange : la mondon de la eksterleĝuloj Parizaj.

Rolis ne nur pluraj konataj esperantistoj kiel Roger Bernard, Raymond Schwarz, Sdrjan Flego kaj Jana Ravŝelj (Internacia Arta Teatro) sed ankaù la konata franca aktoro (de la radio-televido Francia) Marc Darnault.

Eble la filmo ŝajnos al vi iom karikatureca sed ne forgesu ke, en 1964 ĝi aperis inter la unuaj parolfilmo kaj estis realigita per tre modestaj rimedoj : temas pri kuraĝa provo kiu montris vojon ĝis nun malfeliĉe ne plu iritan.

Helpis aliaj konataj personoj kiel Prof. G. Waringhien, tiama prezidinto de la Akademio de Esperanto, kaj Jean Thierry, aùtoro de la Assimil-lernolibro pri esperanto.

Antaùnelonge ***Senlime*** kreis esperanto-surtekstojn cele al estonta surtekstigado en diversajn lingvojn (unue, la lokan dialekton de Kelmis !).

**05-16** 19h30 BE-Kelmis,
Kinarto en esperanto :
projekciado de ***«Angoroj»***
Inf. mardelforge@brutele.be

**<u>Karaokeo en esperanto</u>**

Se ni kelkfoje parolas pri la terapia valoro de esperanto, ni ne forgesu la konatan efikon de muziko por « dolĉigi la morojn », kaj la pedagogian valoron de la kantoj kiel lingvo-instruiloj.

Antaùe, kantadi tamen ofte ne estis facile por multaj personoj. Pro tio, la emo kanti en niaj klubvesperoj iomete forvelkis…

Karaokeo alportis novan teknikan rimedon por helpi nin : ofte troveblas sur la reto dosiero enhavanta la muzikon de kanto en formato mp3, aù eĉ pli bone midi (mid), kie ne enestas la paroloj – kiujn oni povas aldone skribi en teksto-dosieron kiun oni povos (iom post iom, laù la ritmo de la muziko) legi… kaj kanti dum aùskultado de la muziko.

***Senlime*** uzas la softvaron (legilon) «Van Basco» por ludi la karaokeon kaj la eldonilon «Karakan» por krei karaokeojn. Kompreneble, la tekstojn necesis unue traduki aù adapti esperanten. Prefere ni projekcias ilin sur grandan ekranon.

Jam aperis pli ol dek kanzonoj adaptitaj de ***Senlime***, inter kiuj «*Fromaĝ' el Edamo*» (komikaĵo laù «*Etoile des Neiges*» far' la bedaùrita Claude Piron), «*Bela rakonto*» (M. Fugain) kaj «*Mi revas pri hejm'*» (sakflutaĵo el la filmo «*Joyeux Noël*», antaùe surtekstigita de ***Senlime***).

**06-20** 19h30 BE-Kelmis, Select: **karaoke** en esperanto.
Inf. lousberg@senlime.org
http://paginas.terra.com.br/arte/alls/

# UEA, SAT, Esperanta Civito

***Heroldo komunikas*** [HeKo 347 3-A, 29 feb 08] analizon el **« LE MONDE DIPLOMATIQUE »**

*"Le Monde diplomatique" en esperanto aperigis tre interesan analizon de la talenta ĵurnalisto Vilhelmo Lutermano pri la stato de Esperantio, kun aparta atento pri tri subjektoj: UEA, SAT, Esperanta Civito. La analizo estas sobra, foje eĉ draŝa.*

*Ekzemple pri SAT:* "Dum antaùe eblis diri ke SAT garantias la ekziston de PIV, eblas diri nun inverse, ke PIV garantias la ekziston de SAT kaj ke la ekzisto de SAT estas nuntempe la malhelpo por grandskala disvastiĝo de la vortaro en cifereca formo. Krome, la aktuala situacio, en kiu la plenumkomitato praktikas specon de esceptostato, faras ke la «reale ekzistanta» SAT ne spegulas asocion kiun ĝia statuto priskribas kaj preskribas. Rezulte de tio, ĝi estas nun ne tre alloga eĉ por kamaradoj kiuj disponas pri sufiĉe da mono por membriĝi en ĝi. Etoso kaj fortrilatoj inter diktatorecaj statut-rompuloj kaj «statutemuloj» ne lasas multan esperon ke estontaj evoluoj eble povus forigi tiun certe gravan makulon."

*Kaj pri UEA:* "kio esence limigas la agadkapablon de UEA ne estas ĝia piramideco, sed la fakto ke ĝi estas «neŭtrala» en tiu senco ke ĝi ne enmiksiĝas en politikajn kaj sociajn diskutojn ekster la lingva demando. Ĝi zorgas precipe pri la propagando por la lingvo Esperanto kaj pri gravaj servoj por siaj individuaj membroj. Pro tio oni nomas tian organizon «poresperanta», kontraste al tiuj kiuj laboras ne por, sed pere de Esperanto. Alia trajto, tiu kiu limigas la aliĝon al UEA kiel individua membro, estas la fakto ke ĝi postulas sufiĉe altan kotizon, kiun ne povas pagi la plej multaj homoj en la evolulandoj."

*Sed ni okupiĝos ĉi tie nur pri la prezento de la Esperanta Civito:*

"LA TRIA ORGANIZO en Esperantujo estas la sufiĉe freŝdata «Civito», kun sidejo en Svislando.(1) Ĝi celas esti «kvazaùŝtata» asocio(2) agnoskita de la ŝtatoj, kompar-eble kun la ŝtata agnosko de la Malta Ordeno. Ĝi stariĝis de kaj ĉirkaù la skipo kiu eldonas la prestiĝan kaj altnivelan Kultur-gazeton «*Literatura Foiro*», kiu favoras kaj praktikas sian koncepton de la Manifesto de Raùmo, laù kiu Esperanto estas ne nur lingvo, sed ankaù identig-ilo kaj laù kiu la Esperantistaro estas lingva komunumo en diasporo.

La membroj ne bezonas kotizi, kaj kandidatoj povas peti aliĝon, se ili apartenas al iu el la «establoj» ligitaj kun la Civito, ekzemple se ili estas abonantoj de «Literatura Foiro» aù «Heroldo de Esperanto». ĝia strukturo estas piramideca (3) kaj ĝiaj decidorganoj memorigas tiujn de la renesancaj italaj respublikoj: senato, konsulo, ktp.

Ĝia membraro estas kompreneble, rilate politikajn konceptojn, plej diversa, kaj tio speguliĝas en la diversaj «listoj» - blanka (kristana, politike dekstra*), verda (ekologia), ruĝa (politike maldekstra) -, kiuj verŝajne povas agadi eksteren, sed ŝajnas ke ankoraù mankas sufiĉe da membroj por efika agado. La civitanoj videble aktivas en la feminisma movado. Lastatempe stariĝis, ene de la Civito, iu nova maldekstro, kiu, kontraste al SAT, forlasis la nocion de klasoj kaj klasbatalo, opiniante ke klasoj ne plu ekzistas...

Malgraù la ekstrema opini-diferenco de la civitanoj, la asocio partoprenas la mondajn kaj regionajn forumojn, dum SAT partoprenis nur la Eùropan Socian Forumon kaj ne disponas pri la necesaj rimedoj por partopreni la Mondan Socian Forumon. La ĉefaj bremsoj por vasta aliĝo al tiu organizo ŝajnas esti ĝuste ĝia specifeco (4): ke ĝi celas esti kvazaùŝtata asocio agnoskenda de la regnoj de la mondo, de la Unuiĝintaj Nacioj, de Unesko, ktp., kaj precipe ĝia ŝtat-imite piramideca karaktero."

★

*Kelkaj glosoj pri la teksto de kolego Lutermano:*

*1) En Svislando estas nur unu el la sidejoj: tiu de la justica povo. La graveco de Chaùdefono ŝuldiĝas al historiaj kaùzoj kaj al la fakto, ke tie situas la jura sidejo de gravaj paktintoj (KCE, LF-koop, Esperanta PEN, FEM), sed okazis pri tio neniu decido de la Parlamento (kiu plej ofte havis sesiojn en la najbara urbo Loklo).*

*2) Ne asocio, sed konsorcio.*

*3) Piramideca estas centralisma strukturo bazita sur hierarkia akso. La Civito estas federisma realajho, kaj ghiaj instancoj funkcias subsidue al la paktintaj establoj.*

*4) Fakte ne tiu specifeco, sed alia: nome la lingvokono, bazita sur la raumismaj principoj. Esperanto kaj raumismo por la Civito analogias al la hebrea kaj cionismo por Israelo.*

** La Blanka grupo ne esprimas politikon de dekstro, sed de centro.*

# La Verviersa rolantaro por la filmo Asteriks




Catherine LEJEUNIX, Andre FREDERIX, Claude DESAMIX , Pierre-Yves JEHOLIX, Yvan YLIEFIX
Asterix Obelix Jules Cesar Numerodix Assurancetourix

La greko kiu paradas flanke de Delon-Cezaro en *«Asteriks ĉe la Olimpiaj ludoj»* (filmo enirinta la kinejojn la 30an de januaro 2008), estas Kelmis-ano !

Post «*La longa dimancho fianĉa*», Philippe Lanners, kromnomita «Buli», efektive estas elektita por roli kiel Samasas, la reĝo de la grekoj, tiu kiu invitas Cezaron (Delon) ĉeesti la ludojn.

En la studioj de Alikanto, dum 3 monatoj, la aktoro havis la okazon apudi plej grandulojn de la 7a arto : Alain Delon, Gérard Depardieu, Clovis Cornillac, Stéphane Rousseau, Benoit Poelvoorde,…

Ankaù politikistoj Verviersaj, eĉ la urbestroj de Verviers kaj Dison, (timante perdi sian postenon?) sin proponis por ludi en Asteriks. Ve, neniu el ili estis elektita !

Laù Verviersa gazeto « ***Le Jour*** »

N-B : kiu do diris ke niaj nunaj politikistoj nur estas komedianoj ?

# La angla / l'anglais : facile !

On dit que la langue française EST compliquée, mais que dire de l'anglais !

Oni diras ke la franca lingvo ESTAS komplika, sed kion diri pri la angla !

Legu tiun mesaghon ricevitan per la reto !

Lisez ce message reçu par internet !

Dankon al Patrice Joly pro la sendo kaj al tiu, kiu aldonis E-transskribon.

Merci à Patrice Joly pour l'envoi et à celui qui a ajouté la transcription espéranto.

Français: 'de 1H58 à 2H02 : de une heure cinquante-huit à deux heures deux.'
Lauvorta transskribo en Esperanto / transcription au mot à mot en espéranto : de unu horo kvindek-ok ĝis du horoj du.
Anglais : 'from two to two to two two'

Français : 'Trois sorcières regardent trois montres Swatch. Quelle sorcière regarde quelle montre Swatch ?'
Transskribo en Esperanto / transcription en espéranto : Tri sorĉistinoj rigardas tri horloĝojn Swatch. Kiu sorĉistino rigardas kiun horloĝon Swatch ?' (ne estas indikite ĉu temas pri poŝ-au brak-horloĝoj).
Anglais : 'Three witches watch three Swatch watches. Which witch watches which Swatch watch? '

Et maintenant pour les spécialistes...
Kaj nun, por la fakuloj...

Français : 'Trois sorcières suédoises et transsexuelles regardent les boutons de trois montres Swatch suisses. Quelle sorcière suédoise transsexuelle regarde quel bouton de quelle montre Swatch suisse?'
Transskribo en Esperanto / transcription en espéranto : Tri svedaj kaj transseksaj sorĉistinoj rigardas la butonojn de tri svisaj horloĝoj Swatch. Kiu sveda transseksa sorĉistino rigardas kiun butonon de kiu svisa horloĝo Swatch ?
Anglais : 'Three Swedish switched witches watch three Swiss Swatch watch switches. Which Swedish switched witch watches which Swiss Swatch watch switch?'

# Verviersa Angulo

**V**erviersa **E**speranto **G**rupo

**Comité de V.E.G.:**

Président: J. Jacob
19 Chemin de la Rostibouhaye
4910 POLLEUR (THEUX)
Tél. 087/22.10.79

Trésorier: D. Lousberg
25 Rue Pierre Fluche
4800 VERVIERS
Tél. 087/ 087/222030

Secrétaire: J.-M. Jacques
5 Rue Joseph Wauters
4800 VERVIERS
Tél. 087/33.02.92

V.E.G. dépend de l' Association pour l'Espéranto (A.P.E.)
M. Delforge
16 Rue des Glacières
6001 MARCINELLE

---

**Cotisations**

Les espérantistes et sympathisants sont cordialement invités à soutenir notre programme d'action en versant dès aujourd'hui l'une des cotisations suivantes au compte
n°: **000-0245571-64**
IBAN: BE29 0000 2455 7164
BIC: BPOTBEB1
(Banque de la Poste)
de:
Esperanto grupo
25 Rue Pierre Fluche
BE-4800 VERVIERS

*La cotisation de **Senlime**, restée inchangée depuis sa création, est maintenant facultative et laissée à l'appréciation de chacun (mais l'abonnement à ce bulletin en version «papier» reste payant : 10 €).*

**D'avance, merci à tous !**

**A.P.E. 2008** (EGV) **14 €**
**U.E.A. 2008** (MA) **58 €**
***Senlime*** **(abonnement) 10 €**

**en indiquant le nom du membre cotisant, le bénéficiaire, l'année *«cotisation de …. pour ….».***

# Raporto pri la 2007-a agado de *Senlime* (EGV)

Unue, mi rimarkigas ke ***Senlime*** laùstatute **NE** havas prezidanton kaj mi rifuzas tiun titolon (tro ofte nur honoran), preferante nomi min "unua sekretario" (termino klare enhavanta ne nur ideon pri unuaranga rolo kaj povo, sed ĉefe ankaù pri laboro por – kaj servo al - la asocio). La celo de jara raporto fakte estas doni ideon pri la sanstato de la asocio: ĉu ***Senlime*** bone fartas ?

La respondo certe ne troviĝas en la nombro da membroj : nur ok personoj pagis kotizon… sed memoru ke laù nia nova statuto, kotizo estas nedeviga, necesas nur pagi la abonon al la papera informilo ; do la ok pagintoj ja estas membroj sed antaù ĉio abonantoj (do **nia informilo ek de nun estu plusendata nur al ili ok**… kaj al personoj interes-iĝantaj kiujn ni mem elektos, propagando-cele). Estas ankaù notinde ke ĉiu membro devas ĉiujare skribe konfirmi sian membrecon (tion oni jam povas fari por 2008 kaj/aù por 2009).

La sanstaton de asocio kompren-eble rekte montras ĝia aktivado : prijuĝu !
- ĉiumonataj kunvenoj en Kelmis (inkluzive de karaokeo kaj Zamenhof-festo)
- regula eldonado de la informiloj (papere kaj rete)
- prizorgado de la ttt-ejoj (senlime.org por Kelmis/Amikejo kaj senlime.be por E.G.V.)
- surtekstigado de filmoj/operoj («Ring» de Wagner), esperanto-karaokeigo de kantoj
- trilanda renkontiĝo okaze de centjariĝo de E.G.V. (projekciado de «Incubus»,…).

Ne nur kvante sed ankaù kvalite elstaras nia programo. Ni «***senlime***» agadu, kio ne nur signifas ke ni transiru la internaciajn limojn (kiuj, malgraù Eùropo, plu dividas landojn, kulturojn kaj klasojn), sed ni ankaù transiru ĉiajn limojn, inkluzive de niaj propraj internaj limoj mensaj, psikaj, spiritualaj… Multaj programeroj de ***Senlime*** celis enkonduki aù helpi nin sur tiu longa kaj foje malfacila - sed ĉiam entuziasmiga - vojo.

La unua sekretario,
Jean-Marie **Jacques**

Estas malfacile disigi la kontojn de ***Senlime*** dis de tiuj de E.G.V., kies bankkonto estis uzata de S-ro Demarche, antaùa kasisto, por ambaù asocioj ; dum fakte preskaù ĉion organizis E.G.V. por ***Senlime***. Zorgeme pripensata imputado de la diversaj sumoj ekde januaro 2006 ĝis nun kondukis min al preciza rezulto por tiu periodo.

Ĉar la dispartigo de la kontoj ne plu estis aprobita de post la jaro 2000, Raymond Demarche kaj Jean-Marie Jacques faris similan laboron pri la antaùaj jaroj, tiamaniere ke montrighis ke la respektivaj saldoj de EGV kaj ***Senlime*** post tiu periodo estas preskaù perfekte egalaj (du miloj da eùroj).

Ni do, ĝis eventuala modifo konsente de ĝenerala asembleo, disigu la en- kaj el-spezojn laù la proporcio **50 % - 50 %.**

La kasisto,
Didier **Lousberg**